

Bulgara **ESPERANTISTO**



* * *	Deklaracio lige kun la 50-jara datreveno de la fondiĝo de Sovetunio	1
* * *	Deklaracio pri la pactraktadoj rilate Vjetnamion . . .	2
	Jevgenij Jevtuŝenko. Fiera malriĉo. Tradukis: K. Gusev . .	3
	Nikola Aleksiev. Sincera humanisto kaj pacamanto	3
	Volf Messing. „Mi konis lian familion“	5
* * *	Prezidanto Tito esperantisto	6
* * *	Nova Esperanto-lernolibro en Rumanio post 30 jaroj	6
* * *	El la salutparoladoj de la eksterlandaj reprezentantoj:	
	Magomet Isaev — Sovetunio	7
	Dao Anh Kha — Vjetnamio	7
	Bela Berceli — Hungario	8
	Prof. Boĵa Popoviĉ — Jugoslavio	8
	Rudj Graetz — GDR	8
	Draĥomir Koĉvara — Ĉeĥoslovakio	9
	Jan Zawada — Pollando	9
	Momĉilo Ŝaponijĉ — Jugoslavio	9
	Bill Keable — Anglio	10
	Katrin Bossong — Nederlando	10
	William Gilbert — Francio	10
	Donĉo Stanĉev. Filatela ekspozicio pri Esperanto	10
	Linde Knöschke. En la lando de Georgi Dimitrov	11
	Inĝ. Boĵidar Leonov. III Internacia Esperantista Laborbrigado en Bulgario	12
	Nikola Najdenov. Ora Esperanto-Feriado en Pamporovo . .	13
	Petr Trifonov, Marin Jordanov. La someraj kursoj de Esperanto en Druĵevo	13
	Magomet Isaev. La fondiĝo de Sovetunio kaj la solvo de la lingvaj problemoj daŭrigo	14
	Nikola Aleksiev. Gaste en Uzbekistano	16
* * *	Akcepto de Franc Jonas al finnaj esperantistoj . . .	III
* * *	Japanino vojaĝas tra Afriko per Esperanto	III
* * *	Du gravaj kursoj en Usono por anglalingvanoj . . .	IV
* * *	Esperanto en nova universitato	IV
	Deziras korespondi	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Parto el la partoprenintoj en la III-a Internacia Esperantista Laborbrigado en Bulgario

Abonkotizo: iara — 1,40 levoj. Por eksterlando — 4,28 lv. 5 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespondanoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — vutlikigataj senpage.

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

RUMANIO: Mihail Popescu, P. O. Box 205, Bukureŝti 1.

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika, D. 7, kor. 3, kv. 44, 117 449 Moskva V-449.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.

**DEKLARACIO***lige kun la 50-jara datreveno de la fondiĝo de Sovetunio*

Ni staras antaŭ la celebros de unu el la plej grandaj eventoj en la nova historio de la homaro — la 50-jara datreveno de la fondiĝo de l'Unio de la Sovetaj Socialistaj Respublikoj sub la senpera gvido de l'genio de la proleta revolucio Vladimir Iliĉ Lenin.

La vivo montris la grandan signifon de la kreo de potenca unio de sovetaj respublikoj, bazita ne sur la perforto de unujnacioj super aliaj, sed sur ilia libervola unuiĝo en la nomo de la socialista revolucio kaj konstruado de nova socialisma socio. Unuafoje en la tutmonda historio estis kreita libervola unuiĝo de diversnacioj, trovita estis solvo de la nacia problemoj, pri kiu revis la plej grandaj intelektuloj de la homaro. Anstataŭ malamo, malfido kaj militoj oni kreis prudentan fratuon por sekurigi per komunaj fortoj neviditan ĝis nun supreniron de la ekonomio, kulturo kaj socia progreso de ĉiuj nacioj kaj popoloj de USSR.

Hodiaŭ Sovetunio estas potenca ŝtato, apogo kaj espero de ĉiuj progresemaj fortoj de la homaro en ĝia batalo por likvido de l'imperiismo, novkoloniismo, faŝismo kaj la provokataj de ili naciaj rivalecoj kaj maljustaj militoj. Ĝi estas la ĉefa forto en la socialisma familio de la nacioj, kiuj forĵetis la jugon de la kapitalismo kaj imperiismo kaj konstruis praktike komunajn kun interrilatojn de tute nova tipo — prototipo de la estonta socialisma socio en tutmonda skalo.

La bulgaraj esperantistoj, organizitaj en sia Asocio, sendas al la sovetaj popoloj, al la gvidantoj de la Soveta Ŝtato kaj al siaj samideanoj-esperantistoj el la 15 sovetaj respublikoj plej korajn, sincerajn salutojn lige kun tiu ekskluziva historia evento kaj bondeziras al ili novajn, ankoraŭ pli grandajn sukcesojn en la konstruado de la plej justa socio sur la tero — la komunisma socio.

Por ni, bulgaroj, la amikeco kun la popoloj de la granda Sovetunio estas neelĉerpebla fonto de fortoj por ĉiufanka florado de nia socialisma patrolando, neŝanceblebla apogo de nia libero kaj nacia sendependeco, garantio por nia hela estonto, por la plena triumfo de la komunismo en nia lando. Ni memoras kaj eterne memoros la vortojn de nia senmorta gvidanto kaj instruanto Georgi Dimitrov, kiu multfoje diris, ke por ni, bulgaroj, nia amikeco kun la popoloj de Sovetunio estas tiel vivnecesa, kiel la suno kaj la aero por ĉiu viva estaĵo.

Ni, la membroj de CK de Bulgara Esperantista Asocio, esprimas nian profundan certecon, ke la sovetaj popoloj, unuiĝitaj en potenca Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj, en frata unueco kun la popoloj de la ceteraj

landoj, konstruantaj socialisman socion, kiel ankaŭ kun la landoj, kiuj ekmarŝas decide al likvido de la kapitalismo kaj la imperiisma sklaveco, kun la laborista klaso kaj ĉiuj progresemaj fortoj el la kapitalisma mondo gardos la popolojn kontraŭ katastrofa nuklea raketa milito, firmigos la paco sur la tero kaj direktos la fortojn de la homaro kaj de la nuntempa scienca-teknika revolucio al estigo de kondiĉoj por normala vivo kaj krea laboro por la bono de la tuta homaro.

Por triumfo de la paco en la mondo, por reciproka kompreniĝo kaj amikeco inter la popoloj, por rapida disvolvado de la kulturaj rilatoj inter ĉiuj, por plua florado de la nerompebla bulgara-soveta amikeco batalas ankaŭ la bulgaraj esperantistoj, kiuj vidas en USSR la nuran garantion por atingi de tiuj plej humanaj idealoj de la tuta progresema homaro.

La Plenkunsido de CK de Bulgara Esperantista Asocio
(30. X. 1972 — Sofio)

DEKLARACIO

pri la pactraktadoj rilate Vjetnamion

La tutmonda publiko delonge kaj kategorie kondamnis la agresmiliton de Usono kaj ĝiaj satelitoj kontraŭ la popolo de Suda Vjetnamio kaj de DR Vjetnamio. Ĉiuj pacemaj fortoj insistas energie pri serioza rilato de Usono al la laboro de la Pariza Konferenco por paco en Vjetnamio.

La Provizora Revolucia Registaro de Respubliko Suda Vjetnamio kaj la registaro de DR Vjetnamio montris bonan volon kaj paciencojn serĉis reciproke akcepteblan bazon por ĉesigo de l'usona agreso en Hindoĉinio. Ili faris realismajn proponojn, sed la diplomataro de Usono ĉiam trovis manieron por forĵeti ilin.

La lastaj diskretaj traktadoj inter la delegitaro de la registaro de DRV kaj la persona sendito de la prezidento Nixon d-ro Kissinger finkondukis la traktadojn ĝis tre akceptebla ankaŭ por Usono pozicio. Sed malgraŭ la kategorio interkonsento — ke la kontrakto pri ĉesigo de la militadoj estu subskribita fare de la registaroj de Usono kaj DR Vjetnamio je la 30-a de oktobro ĉ. j., la prezidento Nixon mem trovis novajn, tute nepraviceblajn pretekstojn por prokrasti la ambaŭflanke akceptitan daton. Per tia ĉantaĝa politiko Usono celas akiri unuflankajn cedeojn de la popolo de Norda kaj Suda Vjetnamio.

La publika opinio en la mondo estas denove emociita de la truko de Vaŝingtono kaj insistas pri likvido de tiu ĉi malvirta praktiko — saboti subskribon de definitive preta interkonsento — kaj pri praktika ĉesigo de la milito, kiu dezertigis grandegajn regionojn en Suda kaj Norda Vjetnamio.

La plenkunsido de la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio, okazinta la 30-an de oktobro ĉ. j. en Sofio, insistas antaŭ la registaro de Usono ne rezigni la solene akceptitan de ĝi devon kaj subskribi sen mensogoj kaj manovroj la atingitan interkonsenton. Nur tiel oni metos finon al tiu senprudenta imperiista aventuro, kiu kaŭzas terurajn suferojn al la vjetnama popolo kaj englutas grandegajn monrimedojn, kiuj povus esti utiligataj por la socialaj bezonoj de la loĝantaro de Usono.

De la plenkunsido

La plenkunsido de CK de BEA akceptis unuanime ankoraŭ du deklarojn: pri ĉesigo de la israela agreso kontraŭ la arabaj landoj surbaze de la rezolucio de UNO de la 22-a de septembro 1967 j. kaj pri kunvoko de tuteŭropa konferenco por sekureco en 1973 j.



Poezio kaj beletrio

FIERA MALRIĈO

de Jevgenij Jevtuŝenko

Sandaletoj el aŭtaj radbendoj
ĉe Polduloj kaj ĉe la knabetoj.
Kvardek dongoj — salajr' ŝargistina —
fliko ŝi, tamen bele, vestita!
Mankas varoj por vendi surstrate,
nur insignojn — aĉetu ĝissate!
Tamen ili ne ŝatas humili,
superfluas kompato al ili.
Pli moralas ol ajna trezoro,
se malriĉon ne timas la koro.
Ploras panjoj sur cindraĵ ruinoj,
sed forestas ja almozulinoj.
Kaj se iu la manon etendas,

li ne monon — fusilon atendas.
Sen porcio-kupon' — bonhumoro, —
ne ekstermis ĝin mort', nek doloro.
Bomboj homojn ne fleksis ĝis tero —
ne necesas kupon' por fiero!
Laŭ fiero sur la batalvojo
Leningradon ĝemelas Hanojo.
Flikoj de la malriĉo fiera
brilas sur la standardo libera.
Venke tiu ĉi sento sincera
montras trajton morgaŭan, en ver',
se al sia malriĉo fiera
ili levis sin el la mizer'!

El la rusa: Konstantin Gusev
(El „Paco“, n-ro 3/1972)

*Lige kun la 113-a naskiĝtago
de Zamenhof*

SINCERA HUMANISTO KAJ PACAMANTO

de Nikola Aleksiev

prezidanto de Mondpaca Esperantista
Movado kaj de Bulgara Esperantista
Asocio

La tuta konscia vivo kaj agado de
d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof apar-
tenas al la rusa kaj pola kulturoj.

Naskita je la 15.XII.1859 en Rusio,
Zamenhof pasigas sian infanan kaj
junulaĝon en la pola urbo Bjalistok, en
kiu vivas homoj de kvar nacioj —
rusoj, poloj, hebreoj kaj germanoj. La
rusa cara registaro aplikas la principon
„Dividu kaj regu“ kaj incitas la loĝan-
taron el la diversaj nacigrupoj al
furioza nacia malamo. La kontraŭhebreaj
pogromoj estas socileĝaj fenomenoj de
la politika vivo en cara Rusio. Ili vekas
ondon da kolero ĉe la reprezentantoj
de la rusa kaj internacia demokratia
publiko. Fine la venko de la revolucio
en Rusio ĉesigas tiun ĉi malhonoran

fenomenon kaj el la ideo pri frateco
inter la popoloj faras sian praktikan
politikon, fidelesekvatan de la soveta
registaro ankaŭ nun.

La sentema naturo de la junulo
Zamenhof, la plej aĝa el la infanoj en
la familio de Marko Zamenhof, estas
profunde tuŝita de la timigaj bildoj de
nacia fremdiĝo. Jam en fruago lia tuta
estaĵo pleniĝas de arda strebo malkovri
kaj forigi la kaŭzojn de tiu ĉi kruela
fenomeno.

Absolvinte gimnazion en Varsovio
kaj medicinon en la universitatoj de
Moskvo kaj Varsovio, iom poste spe-
cialiĝinte pri okulmalsanoj en Vieno,
Zamenhof neniam ĉesis pensi pri la
problemo de forigo de la malamo inter

popoloj.

En tiu tempo — la 80-aj jaroj de la pasinta jarcento — en la landoj de Okcidenta Eŭropo formiĝas vasta socia movado kontraŭ la milito kiel rimedo por solvado de la internaciaj konfliktoj. Pro la ankoraŭ malforta influo de la marksismo super la laborista movado kaj la demokratiaj medioj, la batalon kontraŭ la milito oni gvidas ne de revoluciaj, sed de etburgaj, pacifismaj pozicioj. La batalo direktiĝas kontraŭ la milito ĝenerale, ne farante diferencon inter militoj justaj kaj maljustaj.

D-ro Zamenhof troviĝas sub la influo de la pacifismo. Li arde kaj abnegacie laboras kaj serĉas en la historio de la homa penso adeptojn de la ideo pri frateco, egaleco kaj kompreniĝo inter la popoloj. Zamenhof publikas en rusa lingvo verkojn, en kiuj analizas la kaŭzojn de la militoj. Li venas al la konkludo, ke la militoj estiĝas pro la diferenco en la religiaj konceptoj de la homoj kaj pro la multaj lingvoj, kiuj malpacas inter si. Zamenhof fariĝas adepto de la instruo de Lev Tolstoj pri neceso de paco kaj amo inter la homoj sendepende al kiu religio ili apartenas kaj en kiu lingvo ili parolas. En tiu spirito li kreas ankaŭ sian filozofion, kiun li nomas „homaranismo“.

Malgraŭ ke Zamenhof ne staras proksime de la ideologio de l'revolucia proletaro en Pollando kaj Rusio, li estas plena de simpatio al la laboristoj kaj la aliaj laborhomoj. Li rifuzas akcepti monon por siaj kuracistaj esploroj kaj al multaj homoj donas el siaj modestaj rimedoj por aĉeti medikamentojn.

Ĝis la lastaj tagoj de sia vivo (aprilo 1917) Zamenhof ne ĉesas batali plej aktive por la justa afero de la paco el la pozicioj de sincera demokrato kaj humanisto. Du jaroj antaŭ sia morto li publikas en la internacia gazetaro specialan alvokon „Al la diplomatoj“. En ĝi li substrekas, ke daŭra paco en la postmilita Eŭropo povas nas-

kigi nur se ĝi estus justa al ĉiuj popoloj, paco sen aneksoj, estimanta la rajtojn kaj interesojn de ĉiuj nacioj senescepte. En tiu alvoko Zamenhof skribas, ke ĉiu lando apartenas al siaj indiĝenoj kaj civitanigitoj, sendepende de tio, kian lingvon, religion kaj supozatan devenon ili havas; eĉ ne unu nacio en la ŝtato devas havi pli grandajn aŭ pli malgrandajn rajtojn ol la aliaj nacioj.

Kompreneble, neniuj burĝa diplomato eĉ pensis labori pri konstruo de daŭra paco post la finiĝo de la Unua Mondmilito.

Devis veni la Oktobra Socialista Revolucio por mobilizi la vastajn popolamasojn en Rusio kaj en aliaj militantaj landoj al batalo por efektivo de la Lenin-slogano: „Paco sen aneksoj kaj kontribucioj!“ Sed la proporcio de la fortoj tamen donas eblecon al la venkinta imperiista grupo altrudi pezan, maljustan pacon akompanitan de okupado de fremdaj teritorioj kaj loĝantaro kaj de monstra kompenspagoj. Nia bulgara popolo mem, propradorse spertis la pezon de la maljusta packontrakto, trudita al ĝi en Neuilly (apud Parizo) de la anglaj-francaj imperiistoj.

Kiam temas pri la meritoj de d-ro Zamenhof antaŭ la progresema homaro, pro kio la Tutmonda Packonsilantaro kaj UNESKO decidis celebri la 100-jariĝon de lia naskiĝo en 1959 j., plej multe da homoj lin memoras kiel kreinton de la internacia lingvo Esperanto. Malmultaj tamen scias, ke la ĉefa motivo, kiu stimulis lin krei tiun lingvon, estas la arda deziro kontribui per ĝi por forigo de la militoj kaj starigo de eterna paco en la mondo. Supertaksante objektive la rolon de la multlingveco kiel ĉefa, eĉ nura kaŭzo por apero de nacia malamo kaj militoj inter homoj el diversaj ŝtatoj, fremda al la kompreno pri la klasa karaktero de la militoj, d-ro Zamenhof venis al la ideo, ke unu internacia neŭtrala lingvo estas sufiĉa rimedo,



kiu efike helpas por forigo de la militoj el la areno de la internacia politika vivo.

La adeptoj de Esperanto ordinare batalas por realigo de la ideoj de d-ro Zamenhof pri paco, amikeco kaj kompreniĝo inter la popoloj. Iuj esperantistoj dividas ankaŭ liajn nesciencajn konceptojn pri milito kaj paco. Tamen la plej sinsekvaj esperantistoj donas al si kalkulon pri la klasaj radikoj de la militoj kaj en internaciaj porpacaj organizaĵoj kaj movadoj batalas aktive kontraŭ la imperiismaj instigantoj de maljustaj militoj. Tiuj esperantistoj uzas la Internacian Lingvon kaj siajn preseldonaĵojn por subteni aktive tiujn popolojn, kiuj estas igitaj de la agresuloj armite batali por sia nacia kaj socia liberigo. Ekzemple la Mondpaca Esperantista Movado (MEM) helpas laŭ siaj fortoj morale kaj materiale la batalon de la vjetnama popolo por plena venko super la jankioj-agresuloj. MEM turnas seriozan atenton ankaŭ al la problemo pri garantio de la eŭropa sekureco kaj por fiaskigo de la frenezaj planoj de la okcidentgermanaj revenĝemuloj kaj iliaj protektantoj el Vaŝingtono. La esperantistoj ne forgesas, ke post la okupado de Pollando en 1939 j. la hitleristaj murdistoj eltrovis ĉiujn proksimumojn de d-ro Zamenhof, submetis ilin al barbaraj turmentoj kaj poste ilin mortigis laŭ plej sovaĝa maniero.

La presorgano de MEM „Paco“ aperas ĉiumonate en diversaj landoj, inkluzive

Bulgarion kaj DR Vjetnamion. La vjetnamaj esperantistoj nomas sian nacian organizaĵon Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio. Ili regule eldonas en Esperanto tutan serion da dokumentoj kaj belartaj verkoj de vjetnamaj verkistoj el la Nordo kaj la Sudo de sia patrolando. Disvastigante ilin tra la tuta mondo, ili kontribuas, ke la vero pri la heroa batalo de la vjetnamaj patriotoj penetru ankoraŭ pli vastajn mediojn de la tutmonda publiko.

La bulgaraj esperantistoj laboras por la venko de l'justa afero de la paco ankaŭ disvastigante tra ĉiuj kontinentoj la veron pri la sukcesoj de socialisma Bulgario kaj pri ĝia pacama ekstera politiko.

Esperanto — serve al paco, al socia progreso kaj amikeco inter la popoloj! Tio estas la plej konvena maniero por esprimi respekton kaj estimon al la nobla agado de la pacamanto d-ro L. L. Zamenhof, kiu revis kaj laboris pri mondo sen armiloj kaj militoj, kiam „inter la popoloj dividitaj“ „dissaltos la obstinaj baroj“ kaj la homaro ekvivos kiel „unu granda rondo familia“ — kiel diras li mem en sia inspiroplena poemo „La espero“, fariĝinta internacia himno de l' esperantistoj.

La progresema pacama homoj en ĉiuj landoj batalas insiste por transformi tiun ĉi noblan revon en vivan realaĵon.

„MI KONIS LIAN FAMILION“

El la rememoroj de Volf Messing pri d-ro L. L. Zamenhof kaj lia familio

La konata psikologo-eksperimentisto Volf Messing, aŭtoro de la libro „Pri mi mem“, dum unu vespero de renkontiĝo kun moskvaj esperantistoj en la Kulturdomo de Medicinistoj, rakontis rememorojn pri la familio de d-ro L. L. Zamenhof.

„Tio okazis antaŭ la Unua Mondmilito. Mi loĝis tiam en Bjalistoko. Mont-

rante miajn psikologiajn eksperimentojn mi renkontiĝis kun multaj elstaraj homoj de la urbo. Ĉi tiuj renkontiĝoj okazis dum miaj vesperaj prelegoj kaj ankaŭ ĉe hejmaj cirkonstancoj: en familioj de la loka intelektularo kaj en la hotelo „Ritz“, kie mi loĝis kaj kiun vizitis multaj estimataj personoj de la urbo.

Inter la loĝantoj de Bjalistoko d-ro

Zamenhof estis tre estimata persono kaj havis grandan aŭtoritaton kiel kuracisto, scienculo kaj sociaganto. Li loĝis kun sia familio tre modeste. Ĉiuj liaj familioanoj estis tre modestaj homoj kaj ĝuis komunan estimon, kiel same d-ro Zamenhof mem.

Mi konis lian filon Adamon, junan kuraciston, kaj alian membron de la familio ankaŭ, kiu estis inĝeniero. Ili ambaŭ estis tre talentaj homoj.

Memorinda estas por mi la renkontiĝo kun la Zamenhofa familio dum mia vespera prelego en la teatro *Palaco*. La filo de Zamenhof — Adamo — interesiĝis pri miaj eksperimentoj kaj invitis min gastigi ĉe ilia familio. Ankaŭ restis en mia memoro la renkontiĝo de la Novjaro de 1914, nelonge antaŭ la Unua Mondmilito, kiu ŝanĝis la vivon de multaj homoj kaj alkondukis d-ron Zamenhof al la antaŭtempa morto. Ĉi tiu novjara renkontiĝo okazis en la hotelo „Ritz“. Gaje kaj vigle ni renkontis la Novan Jaron, tute ne supozante, ke post kelkaj monatoj ektondros kanonoj kaj komenciĝos la monda milito ŝanĝonta la vivon de multaj homoj kaj eĉ de kelkaj popoloj (kaj ke ni estis sur la sojlo de la Granda Oktobro).

Post tiu novjara vespero mi kelkfoje renkontiĝis kun la membroj de la Zamenhofa familio. Ne unufoje al mi en la hotelon „Ritz“ venadis la edzino de Zamenhof, liaj filoj kaj ankaŭ aliaj fa-

*La rakonton surpaperigis
d-ro E. T. Salnikov*

milianoj. Mi konis ankaŭ aliajn parencojn de Zamenhof, kun kiuj mi renkontiĝis en Grodno, sed precipe restis en mia memoro liaj gefiloj, kiuj distingiĝis per iu eksterordinara nobleco, takto, ekskluziva ĝentileco kaj atentemo al la homoj.

Mia lasta renkontiĝo kun gefiloj kaj nepoj de Zamenhof okazis en Varsovio en la jaro 1945.

Pri Esperanto mi ekinteresiĝis jam delonge kaj facile ĝin ellernis. Dum mia gastolado kun miaj psikologiaj eksperimentoj mi traveturis preskaŭ la tutan mondon, renkontiĝis kun multaj homoj kaj ĝoje mi vidis, kiel disvastiĝas ĉie la lingvo Esperanto, kreita de mia persona konato-samlandano d-ro Zamenhof.

La renkontiĝoj en Bjalistoko kaj en Varsovio profunde restis en mia memoro. Nun Pollando estas alia, ne tia, kia mi vidis ĝin komence de la jarcento antaŭ la Unua Mondmilito. Nun ĝi estas kiel neniam ĝis nun belega. Varsovio elkreskis el ruinoj kaj fariĝis ankoraŭ plibela. La samlandanoj de Zamenhof — granda humanisto kaj civitano — sankte kaj gardeme konservas la memoron pri la nobla homo. Pri tio asertas la nomoj de stratoj je la memoro de Zamenhof, la monumento de Zamenhof en Varsovio kaj la larĝa disvastiĝo de Esperanto ne nur en Pollando, sed ankaŭ en la tuta mondo.“

*Tradukis ĝin el la rusa
inĝ. Teodoro Kulagin*

PREZIDANTO TITO ESPERANTISTO

Dum interparolo kun la ĉefo de sia kabineto prezidanto Tito konfesis, ke li regule legas la jugoslavian kulturan esperantlingvan revuon „Suda Stelo“. Tito lernis la lingvon antaŭ 40 jaroj. Li jam konsentis esti la alta protektanto de la venontjara kongreso en Beograd. Alia ŝtatestro, kiu scipovas Esperanton, estas la prezidanto de Aŭstrujo, Franc Jonas.

NOVA ESPERANTO-LERNOLIBRO EN RUMANIO POST 30 JAROJ

Craiova, Rumanujo. — Lastatempe aperis „Manuel de Limba Internationala Esperanto“ (Lernolibro de la Internacia Lingvo Esperanto) de prof. Jozefo Petrin. La libro, publikita por kurso en la universitato de Craiova, ankoraŭ ne estas ĝenerale havebla en Rumanujo.





MAGOMET ISAEV — Sovetunio

Kiam mi staras antaŭ Esperanto-kongreso aŭ kunveno, mi ĉiam sentas grandan respondecon. Sed kiam mi staras antaŭ la Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj, mi sentas duoblan respondecon, ĉar tie ĉi la E-movado estas forta, ĝi okupas unu el la unuaj lokoj en la tuta mondo.

Niaj du popoloj ĉiam helpis frate unu la alian. Jen via Georgi Dimitrov, kies 90-an naskiĝtagon oni celebras nun solene, estas samtempe granda soveta patrioto.

La sovetaĵoj nun staras antaŭ la 50-a datreveno de la fondiĝo de la Soveta Ŝtato kaj nia tuta E-laboro pasas sub tiu ĉi signo.

Mi turnas min al la 38-a Kongreso de BEA per alvoko pri plu fortigo de la kontaktoj inter ni. Ni havas kion diri unu al la alia kaj reciproke helpi nin!
Vivu la soveta-bulgara amikeco kaj la amikeco inter ĉiuj popoloj!

DAO ANH KHA — ĝenerala sekretario de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio

Nia dumembra E-delegitaro jam havis sufiĉan tempon por vidi propraokule kaj konstat proprasparte, kiom agemaj estas vi, la bulgaraj esperantistoj. Vi donas al ni bonan ekzemplon! Ni estas fieraj kaj feliĉaj konstati antaŭ ĉio la fakton, ke el la firmaĵoj de la bulgaraj esperantistoj eliris multaj partizanoj, elstaraj revoluciuloj, kiuj donis kaj donas al la Esperanto-movado en via lando sian abnegacian laboron kaj fruktoportan prestiĝon. . .

Ni venis por danki al vi en la nomo de ĉiuj vjetnamaj esperantistoj por tio, ke ĝis nun vi disvolvis notindan agadon subtene al nia E-movado. Ekde la fondo de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio dum longaj jaroj vi helpis nin per viaj modelaj E-eldonaĵoj, per „Nuntempa Bulgario“ kaj „Bulgara Esperantisto“, per konataj sutmonde belartaj E-verkoj. Feliĉiga estas ankaŭ la fakto, ke unu tre sindona bulgara samideano, d-ro Todor Todorov, en 1957 venis en nian landon kaj fariĝis unu el la faktoroj por kresko de nia E-movado ĉe ĝiaj unuaj paŝoj.

Ni dankas vin ankaŭ pro tio, ke longjare ĝis nun la Bulgara Esperantista Asocio subtenis niajn patriotismajn, socialismajn kaj porpacajn iniciatojn, ke vi, la bulgaraj samideanoj, disvolvis kaj disvolvas aktivan agadon, per kiu morale kaj materiale helpas nian popolon en ĝia batalo kontraŭ la usonaj agresuloj. Ni venis al vi ankaŭ por alvoki vin, niajn bonegajn amikojn, daŭrigi kaj akceli vian agadon subtene al ni en la momento, kiam VPEA mobilizas ĉiujn siajn fortojn por subteni neflankigante la batalon por savo de la nacio kaj la paco, kiam la krimoj de la agresuloj multobligas, kaj kiam nia vjetnama popolo streĉas ĉiujn fortojn por plenumi la testamenton de Ho Chi Minh (Ho Ŝi Min) pri definitiva venko super la Nixon-milito kun la karaktero por ĝi genocido kaj biocido malgraŭ ĝia neevitebla fiasko.

Ni petas vin respondi jese al la plej gravaj kaj aktualaj postuloj de nia popolo.

Ni postulas, ke Nixon tuj kaj senkondiĉe retiru sian armeon kaj militmaterialojn el Suda Vjetnamio kaj Hindoĉinio!

Ni postulas, ke Nixon ĉesigu sian subtenon al la saĝona pupo Nguyen Van Thju, ĉar Thju kaj lia administracio estas por Nixon ilo por „vjetnamigo“ de la milito kaj por efektivigo de l'usona novkoloniismo en Suda Vjetnamio!

Ni postulas, ke la registaro de Usono serioze daŭrigu sian partoprenon en la Pariza Konferenco kaj serioze rilatu al la paca propono de 7 punktoj, farita de la Provizora Revolucia Registaro de l'Suda Vjetnama Respubliko. Ĉar nur tiu ĉi propono povas logike kaj juste ĉesigi la militon kaj doni eblecon al Usono eliri el la milito sen malhonoriĝo.

Ni estas tute certaj, ke sub la saĝa gvidado de la Bulgara Komunista Partio kaj la Registaro de Popola Respubliko Bulgario vi nepre subtenos nian popolon en ĝiaj bazaj, esence gravaj postuloj. Viaflanke tio ĉe la nunaj cirkonstancoj fakte estas la plej grava subteno por VPEA kaj sekve por la estonto de la Esperanto-movado en nia lando.

Vivu la Bulgara Komunista Partio!

Vivu kaj prosperu en paco kaj socialisma konstruado la glora patrujo de Georgi Dimitrov!

Vivu la amikeco inter la bulgara kaj vjetnama popoloj!

Vivu la amikeco kaj la reciproka helpo inter la bulgaraj kaj vjetnamaj esperantistoj!

(Post sia salutparolado s-ano Kha enmanigis al la prezidanto de BEA k-do N. Aleksiev standardon el batalanta Vjetnamio. Vd p. 4 de n-ro 7—8 de „Bulgara Esperantisto“).

BELA BERCELI — Hungario



La Estraro de UEA komisiis al mi, kiel membro de la Komitato de UEA, saluti la 38-an Kongreson de BEA kaj esprimi al vi plej varmajn bondezirojn pri fruktodona laboro kaj ankoraŭ pri grandaj sukcesoj. La Bulgara Esperantista Asocio ĝuas altan honoron kaj estimon ĉe UEA kaj ofte dum komitatkunsidoj Bulgario estas montrata kiel ekzemplo.

Permesu nun al mi kiel sekretario de la Hungara E-Asocio transdoni al vi la sincerajn salutojn de la hungaraj esperantistoj. Niaj du popoloj havas multon komunan. La bulgara popolo suferis sub la otomana jugo, la hungara — sub la jugo de Habsburgoj. Kaj post la Dua Mondmilito ambaŭ niaj popoloj konstruas socialismon, ambaŭ niaj registaroj zorgas nur por la bono de siaj popoloj, ambaŭ niaj popoloj, gvidataj de siaj komunistaj partioj kaj registaroj,

laboras por atingi unu kaj saman celon.

Dum la tempo de la faŝista teroro la demokratiaj esperantistoj en ambaŭ landoj trovis manieron montriĝi kiel batalantoj kontraŭ la faŝismo.

Nun niaj rilatoj vastiĝas kaj firmiĝas ĉiam pli kaj pli. Niaj hungaraj kamaradoj venas en Bulgaron, ankaŭ ni ĉiam estas tre feliĉaj saluti bulgarajn esperantistojn per „bonan venon“ en nia lando.

Mi povas nur admiri kaj eĉ iom envii viajn sukcesojn.

Permesu al mi certigi vin, ke la hungaraj esperantistoj marŝos ĉiam kune kun vi la saman vojon por atingi plej helan estontecon.

Prof. BOJA POPOVIĆ — prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo



Historiaj frataj ligoj ekzistas inter la bulgara kaj la jugoslaviaj popoloj. Ili havas proksimajn slavajn lingvojn. Sed nura komuneco de la lingvoj ne estas sufiĉa por forigi la malkonkordojn. Interkompreniĝon, fratecon alportos nur la marksismo, nur la socialismo.

RUDI GRAETZ — prezidanto de la Centra Laborrondo Esperanto en GDR



Ni speciale ĝojas, ke dum tiu ĉi jaro, kiun en Germana Demokratia Respubliko ni nomas „Georgi-Dimitrov-jaro“, ni povas partopreni la 38-an Kongreson de BEA.

Grandaj estas la sukcesoj, kiujn la bulgaraj esperantistoj atingis en la spirito de Georgi Dimitrov en internacia skalo. Por la bulgaraj esperantistoj Esperanto neniam estis la sola celo, sed rimedo por konigi eksterlande la sukcesojn de la bulgara popolo, por batali por paco kaj socialismo.

La idealoj de la granda internaciisto Georgi Dimitrov estas realigitaj konsekvence en niaj socialismaj landoj. Specialan atenton donis Georgi Dimitrov, la ĝenerala sekretario de Kominterno, al fir-



migo kaj unueco de la komunista mondmovado. Sur tiu ĉi kampo jam multo estas atingita, sed ankoraŭ multo estas farenda.

Ni, la esperantistoj de GDR, komprenas Georgi Dimitrov ankaŭ tiel, ke estas *unuavica* tasko ĉiuflanke evoluigi la politikan, kulturen kaj fakan kunlaboradon de la E-organizaĵoj en la socialisma tendaro. De tiu ĉi akurata politika kunlaboro dependas esence, ĝis kiu grado la Internacia Lingvo gajnos ankoraŭ pri grandan signifon en niaj landoj.

La evoluo de la socialisma integriĝo, objektiva procedo, donas al ni, esperantistoj, bonajn kaj multajn eblecojn.

La esperantistoj de GDR, sinceraj admirantoj de la celdirektita agado de la bulgaraj esperantistoj, speciale ĝojas, ke la koraj kontaktoj inter viaj kaj niaj esperantistoj kreskas konstante.



*DRAĤOMIR KOČVARA —
vicprezidanto de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio*

La kongreso de BEA pasas sub la signo de la Dimitrov-jubileo. Tio forte impresas nin. Georgi Dimitrov estas tro populara ankaŭ en Ĉeĥoslovakio. Multaj stratoj, placoj, fabrikoj ktp. portas lian nomon. Mi opinias, ke Angela Davis estis inspirita ĝuste de la ekzemplo de Georgi Dimitrov dum la juĝproceso kontraŭ ŝi.

JAN ZAWADA — Pollando

Bulgaroj kaj poloj bone konas unu la alian. Nia celo estas komuna: konstrui socialismon.

La Centra Estraro de PEA komisiis min ne nur saluti vian Kongreson, sed ankaŭ subskribi kontrakton pri kunlaborado kun la bulgaraj esperantistoj, kiel tion ni faris kun la hungaraj esperantistoj. Do, helpi unu la alian.



*MOMČILO ŠAPONIJC — prezidanto de LKK de 58-a
UK de Esperanto, Jugoslavio*

Mi ne povas ne esprimi mian ĝojon, ke mi ĉeestas tian entuziasman kongreson, kiun partoprenas pli ol 1000 personoj. Mi neniam aŭdis pri tia nacia kongreso, malgraŭ ke mi estas esperantisto jam 40 jarojn. Kaj se tiom multe da esperantistoj venis ĉi tien, tio signifas, ke en Bulgario oni multe laboras por Esperanto. Via lando okupas la unuan lokon ne nur laŭ proporcia nombro de la esperantistoj, sed ankaŭ laŭ absoluta nombro. Inter la nemultaj pioniroj de Esperanto dum la pasinta jarcento kelkaj estas bulgaroj. Tio montras, ke jam de la komenco Esperanto trovis ĉi tie bonan akcepton. Granda indeco por la bulgaraj esperantistoj estas tio, ke ili laboras bone por paco kaj kunlaboro inter la popoloj.

Kiel prezidanto de LKK de la 58-a Universala Kongreso de Esperanto en Beograd la sekvan jaron mi tutkore invitas la bulgarajn esperantistojn amase ĝin partopreni. Vi estas nia frata kaj najbara popolo. Ĉe ni vi trovos fratan akcepton.





BILL KEABLE — Anglio

Mi ne povas ne rakonti pri la propagando en Anglio, kiu prezentas la vivon en via lando nur en nigro. Kaj mi konfesas, ke miaj amikoj timis, ĉu vere mi sukcesos reveni el Bulgario. . .

Kun entuziasmo mi parolos nun al ĉiuj, kiom mi estas kontenta, ke mi venis Bulgariion, kaj kiom la faktoj, kiujn mi vidas ĉi tie, kontraŭstaras tion, kion skribas pri vi la burĝa propagando.

Nun tie ĉi mi ne povas rakonti, kiom peze vivas la labor-homoj en Anglio, kiel la hejmosposedantoj senĉese plialtigas la lupagojn, ĝenerale en kia necerteco vivas la homoj en nia lando. Tio validas ankaŭ pri la negrandaj kapitalistoj, kiuj ne scias, kiun mantenon ili vekigos bankrotigitaj de la grandaj monopoloj.

„Bulgaraj esperantistoj, uzu Esperanton por rakonti la veron pri via lando, pri via popolo, pri viaj sukcesoj!“ — tio estas mia alvoko nun. Mi deklaras, ke mia vizito en Bulgario plenigis min per nova entuziasmo vivi, labori kaj batali por paco kaj socialismo.

KATRIN BOSSONG — Nederlando

Mi esprimas mian admiron pri la konstantaj sukcesoj de Bulgario, kiujn mi tre bone konstatis, vizitante ĝin trian fojon. Ne estas alia lando, en kiu mi kaj mia edzo havas tiom da personaj amikoj, kiel Bulgario. Kaj ĉi tien altiras nin ne nur la nepriskripeblaj belaĵoj de la lando, sed pleje la varma gastamo kaj sincereco de la bulgara popolo.

Eble vi ĉiuj scias pri la televida E-kurso en Nederlando. Mi alvokas ankaŭ vin fari antaŭ la Bulgara Televizio insistantajn paŝojn pri Esperanto-kurso.

WILLIAM GILBERT — ĉefredaktoro de „Paco“, Francio

Mi ne povas ne esprimi mian kontenton, ke la tuta Kongreso de BEA pasas sub la signo de la 90-a naskiĝdatreveno de Georgi Dimitrov. Kaj mi ne povas ne esprimi mian kontenton, ke el la buŝoj de la bulgaraj delegitoj kaj el la buŝoj de la eksterlandaj gastoj oni aŭdas unu kaj saman alvokon — pri paco en la mondo, pri paco en Vjetnamio — zorgo n-ro 1 de la homaro.

FILATELA EKSPOZICIO PRI ESPERANTO

Lige kun la 38-a Kongreso de BEA, de la 3-a ĝis la 10-a de julio en Smoljan laŭ iniciato de la Asocio de Bulgaraj Filatelitoj kaj per la rekta kunlaboro de la lokaj Filatelista kaj Esperantista Societoj estis organizita filatela ekspozicio.

Ĝi estis aranĝita en la antaŭsalono de la Sindikata Kulturdomo. Samtempe la E-societo aranĝis fotoekspozicion spegulantan la disvolviĝon de Esperanto. Ambaŭ ekspozicioj kompletigis unu la alian kaj tio kontribuis por ilia pli granda sukceso.

La elmontritaj markkolektoj estis renkontitaj kun merita intereso. La esperantistoj aparte admiris la kolekton de la malnova filatelito kaj esperantisto Ljubomir Leviĉarov spegulantan la diversflankan agadon de la esperantistoj en la tuta mondo. Kun atento estis renkontita ankaŭ la kolekto „Georgi Dimitrov“ de Aron Talvi, ricevinta la Grandan Nacian Premion de la Internacia Filatela Ekspozicio „Socfileks 72“, dediĉita al la 90-a naskiĝtago de Georgi Dimitrov. Estis ankaŭ fragmentoj el la kolektoj de P. Petrov, spegulanta la he-



roan pasintecon de BKP, kaj de la Urba Klubo de l'Junaj Filatelistoj en Sofio, dediĉita al la granda Lenin.

Tiu ĉi ekspozicio, la unua tiuspeca en la urbo, estis amase vizitita. Krom de pli ol mil delegitoj kaj gastoj de la Kongreso, la ekspozicio estis vizitita ankaŭ de 2300 junpioniroj, partoprenantoj de la Folkloro Festivalo „Junpioniraj Orfeo-Festoj“, pli ol 600 brigadanoj kaj multaj civitanoj de Smoljan kaj la ĉirkaŭaj vilaĝoj. En la libro por impresoj multaj delegitoj de la Kongreso, civitanoj kaj junuloj esprimis sian dankon pro la donita al ili ebleco konatiĝi pere de poŝtmarkoj kun la vivo kaj agado de V. I. Lenin kaj G. Dimitrov, kun la historio de BKP kaj la varia agado de la espe-

rantistoj, esprimante la esperon, ke simi la ekspozicio ne estos la lasta.

Tiel per la komunaj penoj de filatelistoj kaj esperantistoj estis efektivigita iniciato, kiu sendube donis pozitivajn rezultojn. Ni devas danki al la prezidantoj de la Filatela kaj Esperantista Societoj en la urbo kaj ankaŭ al k-dino Tomova, sekretariino de la Distrikta Komitato de Komsomolo, kiu energie kontribuis, por ke la ekspozicio estu inkluzivita en la programo de objektoj vizitendaj de la partoprenantoj en la Festivalo kaj la brigadanoj.

Dončo Stanĉev

El „Filatela Revuo“ n-ro 7/1972

Letero el GDR

EN LA LANDO DE GEORGI DIMITROV

Bulgara Esperantista Asocio kaj la Kultura Centro de la Germana Demokratia Respubliko en Bulgario organizis komune solenan vesperon* honore al la 90-a naskiĝdatreveno de Georgi Dimitrov. Mi havis la ĝojigan taskon, komisiite de Centra Laborrondo Esperanto en la Germana Kulturligo, paroli pri la temo „Kiel GDR plenumas la testamenton de Georgi Dimitrov“.


Forta aplaŭdo pruvis, ke plaĉis la programo, kiu enhavis salutparoladojn de N. Aleksiev, prezidanto de BEA kaj MEM, de d-ro G. Schreiter, reprezentanto de la Kulturcentro de GDR en Bulgario, la menciitan prelegon, multflankan kulturprogramon kun pianludo, deklamado, kantado kaj teatraĵo, kaj fine esperantlingvan kolorfilmon „20 jarojn Germana Demokratia Respubliko“.

La bulgaraj esperantistoj, kiuj kapablas organizi tiom allogajn kaj interesajn kunvenojn, meritas nian admiron kaj dankon. Tamen mi kiel preleginto volas admoni kaj danki ĉefe la unikan gastemon de la bulgaraj geamikoj kaj la kortuŝan prizorgon dum mia tuta, neforgebla bela restado en Sofio. La kamaradinoj Rajna Arnaudova, Vasja Petrova kaj la kamaradoj Nikola Aleksiev, Asen Grigorov, Nano Nanov kaj aliaj afable akompanis min al multaj vidindaĵoj kaj ebligis al mi la konatiĝon kun la bulgara historio, kulturo kaj politiko, kun la bulgaraj naturbelajoj kaj ĉefe kun la bulgara animo, kun la bulgara homo. Mi devus skribi plurpaĝan artikolon por inde laŭdi ĉiujn travivaĵojn: ĉu la viziton de la Muzeo de la Revolucia Movado, ĉu la ĉeeston de solena distingo de la bulgara popolheroino Cola Dragojĉeva per Lenin-pacpremio, ĉu koncerton de Leningrada Simfoni-Orkestro, ĉu promenadojn kaj ekskursojn en kaj ekster la ele-

gante kreskanta Sofio enmeze de ĝiaj parkoj, ĝardenoj kaj montaroj aŭ ĉu, fine, la ĉion kronintan ekskurson al la mondfama pitoreska Rilamonaĥejo.

Multon mi eksciis pri la personeco de G. Dimitrov, precipe de A. Grigorov kaj N. Aleksiev, kiuj havis la feliĉon kontakti kun li. La vizito de Dimitrov-Maŭzoleo estis inter la solenaj momentoj de mia restado. Tio, kion tiu batalema kaj kuraĝa gvidanto antaŭdiris iam,

La partoprenantoj en la Hungara Kulturfestivalo (17—23 de julio c. j.) prezentis florkronon antaŭ la busto de Georgi Dimitrov en Budapeŝto.



* Vidu delalan raportaĵon pri ĝi ankaŭ en n-ro 7—8 de „Bulg. Esp-to“, p. 12.



III INTERNACIA ESPERANTISTA LABORBRIGADO EN BULGARIO

En la komenco de 1946 j., donante la ĝeneralajn liniojn por evoluo de RMS (Laborista Junulara Unuiĝo), Georgi Dimitrov atentigis, ke la junularo devas esti iniciatanto de vasta movado de sindona libervola laboro por konstruo de sia libera Patrujo. Partoprenante la libervolajn laborbrigadojn la junularo edukiĝas en spirito de estimo kaj amo al la laboro, ĝi rigardas la laboron ne kiel humiliĝon, sed kiel honoron kaj fieron, kiel plenumon de alta patriota kaj internacia devo.

Plenumante la rekomendon de Dimitrov la bulgara junularo donis grandan kontribuon por la renovigo de sia patrolando. Tiel komenciĝis la glora historio de la brigadana movado en Bulgario. Kiel monumentoj de tiu movado restos la Trapasejo de la Respubliko (Hainboaz), la fervojlinio Loveĉ — Trojan, la barajlagoj „Georgi Dimitrov“, „Aleksandr Stambolijski“ k. a.

La junaj bulgaraj esperantistoj ne restis flanke de tiu altpatriota movado. Ili formis E-brigadon, kiu laboris ĉe la barajlago „G. Dimitrov“. En 1965 j. nacia E-brigado el 60 gejunuloj, reprezentantoj de diversaj E-societoj en la lando, donis sian kontribuon por konstruo de la panorama vojo Dragalevci — Montodomo „Aleko“ sur Vitoŝa.

Sekve de la intereso eksterlande pri nia brigado, la Estraro de BEJ decidis kaj en 1966 j. estis organizita la I-a Internacia E-Laborbrigado, kiu laboris en la antikva ĉefurbo Veliko Târnovo. En 1967 okazis la II-a Internacia E-Laborbrigado en Loveĉ.

Ĉi-jare, kiam la tuta bulgara popolo solene celebris la 90-an naskiĝtagon de sia amata gvidanto Georgi Dimitrov, la junaj bulgaraj esperantistoj ne restis fremdaj al tiu celebrado.

(El paĝo 11)

nun estas realo. Bulgario tre rapide fariĝis moderna industria lando kaj estimata kunulo en la ĉeno de la socialisma ŝtataro kaj en la mondo. Ĉiu enloĝanto rajtas esti fiera pro la multaj akiraĵoj kaj la rapideco de la konstruado de l' socialismo en Bulgario, sed fiera ankaŭ pro la honorigo de la longa vico da batalantoj, kiuj pereis, kiuj oferis sian vivon por la liberigo de la patrujo.

Alveninte Sofion mi konis tie neniun kaj nenion. Post kvin tagoj mi travivis kortuŝan adiaŭon meze de multaj floroj kaj kisoj. Mi forveturis pli riĉa ol reĝo, ĉar mi gajnis multajn geamikojn kaj abundajn impresojn. Mi kunprenis trezoron da memoroj kaj profundan dankemon. Ĝis baldaŭa revido, karaj bulgaraj esperantistoj!

*Linde Knöschke,
Berlin*

Inter la diversaj junularaj iniciatoj dediĉe al Dimitrov ili organizis la III Internacian E-Laborbrigadon. Ĝi okazis de la 14 de aŭgusto ĝis la 9 de septembro en la bela subbalkana urbo Karlovo. La brigadon partoprenis 62 gejunuloj el USSR, ĈSSR, Pollando, Hungario, Francio kaj Bulgario. Ĝiaj organizantoj estis BEJ kaj UK de DKMS — Karlovo. La laboro ne estis tre facila, sed tio ne timigis la entuziasmajn brigadanojn. La komuna vivado unuiĝis kaj amikiĝis ilin.

La solena inaŭguro okazis per tuturba miŝingo sur la urba placo. Partoprenis ĝin ne nur la brigadanoj, sed ankaŭ multaj civitanoj de Karlovo. Bonvenigajn salutojn kaj bondezirojn al la brigadanoj direktis: inĝ. A. Maĉev — unua sekretario de UK de DKMS, inĝ. S. Simeonov — vicprezidanto de BEA, k-doj Ŝatov — sekretario de la Urba Soveto de Karlovo kaj Ŝindev — vicedirekto de la entrepreninvestanto.

En la nomo de la brigadanoj respondis: V. Kazanova (USSR), St. Maĉek (ĈSSR), Lidia Kuhn (Pollando), L. Foldvari (Hungario) kaj Marie-Hélène Bourdier (Francio). Fortan impreson al la ĉeestantoj faris la gratulparolado de la soveta junulino Valentina Kazanova, kiu interalie diris: „Mi estas feliĉa, ke mi povas partopreni la Dimitrovan brigadsomeron. Por ni la bulgara popolo estas kara kaj proksima. Nin unuiĝas ne nur la slava sango, sed ankaŭ nia komuna celo, nia hela komuna estonteco — la komunismo, kiun ni, la junaj homoj, finkonstruos. Kiel por la bulgara popolo, tiel ankaŭ por la soveta popolo Georgi Dimitrov estas kara kaj amata gvidanto. Ĉe ni en USSR la nomo de Dimitrov estas sankta kiel la nomo de Lenin. Ankaŭ pro tio kaj tute ne hazarde mi kaj mia amiko venis kun granda ĝojo Bulgarion“. En la solenaĵo inĝ. B. Leonov — ĉefkomandanto de la brigado, ricevante la brigadstandardon de inĝ. S. Simeonov, esprimis la deziron de la brigadanoj obstine labori kaj honore reprezenti la E-movadon. La solenaĵo estis akompanita de solena ludo de soldata orkestro.

Interesaj aranĝoj ne nur por la brigadanoj, sed ankaŭ por la urbanaro estis ankaŭ la vesperoj de la nacioj, organizitaj kune kun kelkelkaj el ties kulturaj centroj en Sofio. Aparte dankemaj estas la brigadanoj al k-do Ŝipoŝ — direktoro de la Hungara Kultura Instituto en Sofio, pro lia interesa prelego pri Hungario. Neforgesebla por ĉiuj restos la spektaklo de la geaktoroj de la Bulgara Esperanto-Teatro Belka Beleva kaj Anani Anev.

Estis organizita ankaŭ vespero, dediĉita al G. Dimitrov. Kun granda intereso ĉiuj aŭskultis rememorojn de la veterano de l'bulgara E-movado kaj eminenta esperantisto k-do Asen



Grigorov, havinta la feliĉon esti sekretario de la glora gvidanto. Estis organizitaj amuzvesperoj, renkontiĝoj kun la loka junularo, ekskursoj. La brigadanoj vizitis Sopot kaj Kalofer kaj konatiĝis kun iliaj rimarkindaĵoj. La ŝatantoj de la naturo vizitis la montopinton Botev. Interesa estis la dutaga ekskurso Karlovo—Kazanlâk — Šipka — Gabrovo — Monaĥejo de Drjanovo — Veliko Târnovo — Loveĉ.

La brigadanoj partoprenis la tuturban manifestacion okaze de la nacia festo de Bulgario — la Naŭa de Septembro, kio faris grandan impreson al la urbanaro.

Por la nespertaj esperantistoj estis organizita kurso por lingva perfektiĝo.

Pro obstina laboro per diplomoj estis premiitaj Vl. Romanov kaj V. Kazanova (USSR), St. Marĉek kaj J. Zidekova (ĈSSR), L. Foldvari (Hungario), Lidia Kuhn (Pollando), Ivan Cvetanov (Bulgario) k. a.

Dum la fosado ĉe la laborobjekto la brigadanoj trovis restaĵojn de antikva tombejo kaj aliajn antikvaĵojn. Ili tuj estis transdonitaj al la urba muzeo, kies direktoro publike dankis al la brigadanoj.

Forpasis la brigadtagoj kun riĉaj rememoroj pri la travivita monato en Karlovo, kun fortaj impresoj pri la nova amikeco, naskiĝinta ĉe la kondiĉoj de la komuna vivo kaj laboro. Kaj kun revoj pri novaj renkontiĝoj ie en Esperantujo.

ing. Bojidar Leonov
ĉefkomandanto de la brigado

ORA ESPERANTO FERIADO EN PAMPOROVO 17—30. IX. 1972

Ripozi ĉe Nigra Maro — t. e. baniĝi kaj sunbruniĝi.

Ripozi en montaro — t. e. spiri freŝan aeron.

Ripozi en Ora Esperanto-Feriado en Pamporovo tamen signifas variecon de ripozoj, amuzoj, promenoj k. a.

Antaŭ matenmanĝo laŭdezira korpokulturo refreŝigas la feriantojn. Dum matenmanĝo sekvas la konstanta demando: hodiaŭ kien? Kaj kamarado Nikola Nikolov havas pretan respondon: „Je la 8 kaj 30 minutoj ni ekveturos al . . .“ — kaj montras novan direkton, novan objekton. Dek tagojn sub lia sperta gvido la feriantoj supreniris la montopintojn Sneĵanka kaj Murgavec, vizitis la Lagojn de Smoljan kaj Siroka Lâka, migris tra la koniferarbaroj.

Esti en Rodopi-montaro kaj ne manĝi fun-

La kurso por progresintoj en Druĵevo.
Meze la kursgvidanto S. Hesapĉiev.

LA SOMERAJ KURSOJ DE ESPERANTO EN DRUĴEVO

En 1972 j. Bulgara Esperantista Asocio kaj Bulgara Esperantista Kooperativo organizis en Druĵevo du E-kursojn por komencantoj kun gvidantoj Petja Ĉakova kaj Dimitr Borisov kaj unu por progresintoj kun gvidanto Simeon Hesapĉiev. La samideanoj el Kjustendil sendis entute 17 kursanojn.

La instruado iris laŭ programo kaj estis ilustrita per bildoj, mapoj, skemoj, skizoj, desegnaĵoj. Tial la kursanoj partoprenis aktive.

Ni estas tre kontentaj de la laboro en la kurso por progresintoj. Ĉe la verkado de rakontoj laŭ bildo nia instruisto ne donis al ni pretan vortaron, sed ni devis kompili ĝin dum la verkado kaj poste ĉe la ripeta rakontado reteni la vortojn en la memoro. Ni lernis korekte, certe kaj libere pensi en Esperanto kaj esprimi niajn pensojn per korekta parolado. Estis faritaj diversaj parolekzercoj. Ni, la kursanoj, esprimas nian dankon al BEA, al BEK kaj al nia instruisto. Per la kurso ni plivastigis niajn konojn pri la lingvo. Samtempe per la bona ripozo ni firmigis nian sanon. Ni estis konkorda familio, en kiu regis amikaj kaj kamaradaj rilatoj. Iuj kursanoj helpis al siaj kamaradoj, kiuj bezonis helpon.

Krom la lernado mem ni, la kursanoj en la kurso por progresintoj, sufiĉe multe laboris por plibonigi la kondiĉojn en la tendaro. Ni ĉirkaŭhakis fruktarbojn kaj pinojn, ĉirkaŭfosis ilin kaj faris malgrandan someran banejon. En tiu ĉi laboro speciale distingiĝis la kjustendilanoj Stojan Todorov kaj Kiril Kostov kaj la sofiano Danĉo Dragnev.

Ofte vizitadis nin gastoj. Iuj rakontis pri la malfacilaĵoj en la kursoj dum la pasinteco tie ĉi.

La tendaro en Druĵevo devas disvolviĝi kaj la kursoj en ĝi devas prepari novajn adeptojn de nia nobla movado.

Petr Trifonov — Godeĉ
Marin Jordanov — Sofio



LA FONDIĜO DE SOVETUNIO KAJ LA SOLVO DE LA LINGVAJ PROBLEMOJ

de Magomet Isaev — Moskvo

(daŭrigo el n-ro 10)

Lenin kaj la Partio klare komprenis, ke konkerinte la regpotencon kaj proklaminte la principon de egaleco inter la nacioj kaj la naciaj lingvoj, la proletaro devis komenci obstinan batalon por likvidi la hereditan faktan mallecalecon inter la popoloj.

La unua tasko estis helpi la laboramasojn de la nerusaj popoloj atingi la antaŭenirintan centran Rusion. La neiliigo de la fakta nacia malegaleco estas longedaŭra procedo, kiu postulas obstinan batalon kontraŭ ĉiuj restaĵoj de nacia subpremo kaj koloniisma jugo.

Plenumante la direktivojn de V. I. Lenin nia Partio levis la sovetajn popolojn al socia kaj kultura revolucio, kiun partoprenis ĉiuj socitavoloj. Ne malgrandan rolon en tiu ĉi batalo ludis ankaŭ la sciencistoj-lingvistoj, kiuj kune kun la kulturagantoj ĉe diversaj stadioj de la nacia-ŝtata konstruado estis solvantaj multnombrajn lingvajn problemojn.

La sovetaj sciencistoj inde plenumis la starigitan antaŭ ili eksterordinare honoran, sed samtempe pezan taskon studi la multnombrajn diverstipajn lingvojn, perfektigi preskaŭ ĉiujn literaturojn kaj krei alfabeton por 50 antaŭe senalfabetaj lingvoj. Similan eksperimenton la historio de la kulturo ankoraŭ ne konas. Oni povas klarigi la sukceson de la sovetaj lingvistoj plejparte per la marksisma-leninisma metodologio, ankaŭ per tio, ke en sia la-

gojn — tio estas neimagebla! Preskaŭ ĉiun tagon sur la kuirforno estas fungoj — jen bakataj, jen fritataj. Ne malofte estas kantoj kaj dancoj, organizitaj okaze de la riĉa fungorikolto. Tiam estas ankaŭ ŝercoj, precipe kun timuloj, nemangintaj ĝis nun tiun ĉi bongustan manĝaĵon.

Senson'e, tute sensente foriris 14 tagoj!

Venontan someron — ree.

Nikola Najdenov,
V. Târnovo

boro ili aplikis sociologiajn esplormetodojn.

Nature, la agado de la sciencistoj dum la koncernaj periodoj ne limiĝis nur ĉirkaŭ la problemoj de la literaturo, kiuj, sendube, estis la bazo de la lingva konstruado. La kreo mem de alfabetoj postulis la solvon de multnombraj grandaj kaj malgrandaj problemoj. Sed malgraŭ tio la lingvistoj dum la periodo, kiam kreiĝis la nacia ŝtateco, estis okupitaj pri la solvo de aktualaj demandoj, ligitaj kun la kreado de naciaj lernejoj, kun organizado de sociaj kaj ŝtataj institucioj en la respublikoj kaj la regionoj, kun preparado de naciaj kadroj por ili ktp.

Lige kun tio la specialistoj aparte penadis por krei la necesan terminaron de la literaturaj lingvoj, sen kiu tiuj lastaj ne povus servi la novajn sferojn de ŝtata kaj socia vivo de la nacioj kaj popoloj.

La aktiva prilingva konstruado, okazinta surfone de la rapidega kultura kaj nacia disvolviĝo, enspiris novajn vivsukojn al la literaturaj lingvoj, kiuj dum la jaroj de la soveta regpotenco trairis vojon superantan ilian multmilionan evoluon dum la antaŭrevolucia periodo. Impeta plivastiĝo de la sociaj funkcioj de la lingvoj, kiuj jam havis literaturon, kaj speciale de tiuj, kiuj dum la soveta tempo ekhavis tian — jen la baza rezulto de ilia evoluo dum la lastaj jardekoj.

La disfloriĝo de la literaturaj lingvoj, ilia demokratigo kaj orientigo al la parola popola lingvo nemezureble levis ilian signifon en la socia vivo de la popoloj, altigis ilian aŭtoritaton. La literaturaj lingvoj pliriĉiĝis surbaze de la dialektoj, samtempe plifortigante la procedojn de niveligo de la dialektaj diferencoj, kio siavice favoris la stabiligon de la sovetaj socialismaj nacioj.



En la disvolviĝo de la lingvoj en nia lando gravegan rolon ludis kaj daŭre ludas la procedoj de reciproka influo kaj reciproka riĉigado.

En la nuntempa stadio de la lingva konstruado oni plu akcentas la problemojn de la kulturo de l' naciaj literaturaj lingvoj, same la kulturon de la rusa lingvo ĉe la nerusa loĝantaro de la respublikoj. Antaŭ la lingvistoj eksstaras samtempe multaj teoriaj problemoj, kies solvo sendube helpas la pli celkonforman reglamenton de la estontaj evoluo kaj funkciado de la multnombraj lingvoj en nia lando ĉe la kondiĉoj de difinitaj formoj de nacia ŝtateco.

La riĉa sperto de la lingva konstruado kaj lingva evoluo permesas al nia Partio perfektigi sian lingvopolitikon. Tiurilate aparte notindaj estas la tezoj de la nova Programo de KPSU pri la lingva vivo de Sovetinio. En tiu Programo, kiel oni scias, kun nova forto eksonis la marksismaj-leninismaj tezoj pri plena egalrajteco de ĉiuj lingvoj. En la regiono de la naciaj interrilatoj estas starigita jena tasko: „Ankaŭ estontece certigi liberan disvolviĝon de la lingvoj de l' popoloj de Sovetunio, plenan liberon por ĉiu civitano de USSR paroli, eduki kaj inuigi siajn infanojn en ĉiu lingvo, permesante neniajn privilegiojn, limigojn aŭ devigojn ĉe la uzado de iuj aŭ aliaj lingvoj.“¹

Kune kun tio ĉi en la Programo de KPSU unuafoje estas klare formulita la tezo pri la lingvo de la internacia komunikado. La okazinta en la vivo procedo de libervola — paralele kun la gepatra—studado de la rusa lingvo havas pozitivan signifon, ĉar ĝi kunhelpas la interŝanĝon de sperto kaj aligon de ĉiu nacio kaj popolo al la kulturaj atingajoj de ĉiuj popoloj de USSR kaj al la tutmonda kulturo. La rusa lingvo fakte fariĝis komuna lingvo de

la internacia komunikado kaj kunlaborado de ĉiuj popoloj de USSR.²

Tiu ĉi rolo de la rusa lingvo estas starigita de la historio mem.

La elekto de unu el la ekzistantaj en la lando naciaj lingvoj kiel ilo por internacia komunikado difiniĝas de diversaj objektivaj faktoroj, inter kiuj plej gravaj estas la konsideroj pri ekonomiaj-produktadaj utiloj, psikologiaj konsideroj, historiaj tradicioj, la reala disvastiĝo de iu lingvo kaj ĝia evolueco, perfekteco.

Ĉe la kondiĉoj de multnacia lando, skribis V. I. Lenin, „la bezonoj mem de la ekonomia cirkulado difinas tiun lingvon de konkreta lando, kiun scii estas utile por la plimulto en la intereso de la komercaj rilatoj. Kaj tiu ĉi difino estos ju pli firma, des pli volonte ĝin akceptos la loĝantaro de diversaj nacioj, ju pli rapida kaj vasta, des pli konsekvenca estos la demokratismo. . .“³

La rusa lingvo estas gepatra lingvo por la multnombra rusa loĝantaro kaj proksima-parenca lingvo por la multnombra ukraina kaj blankrusa loĝantaro. Dank' al la historia evoluo de nia lando konado de la rusa lingvo estas delonge disvastigita ankaŭ inter aliaj nacioj kaj popoloj. Estante lingvo de la plej evoluinta nacio, marŝanta frunte de la revoluciaj transformiĝoj en nia lando kaj meritinta la amon kaj la estimon de ĉiuj aliaj popoloj, la rusa lingvo nature komencis transformiĝi en lingvon de komunikado kaj kunlaborado de ĉiuj popoloj ĉe la socialismo, kiam la ekonomiaj kaj produktadaj internaciaj ligoj miloble pli-fortiĝis, kiam intensiĝis la internaciigo de la loĝantaro, kiam estis detruitaj la psikologiaj baroj kaj sur ilia loko ekfloris frata amikeco, fido kaj reciproka helpo.

En nia vastega kaj multnacia lando

¹ Programo de KPSU, 1964, p. 115.

² Samloke, p. 115.

³ V. I. Lenin. Kompl. verk., v. 19, p. 318.

Al la 50-jariĝo de l'Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj estis dediĉita antaŭ nelonge brila manifestajo: en Moskvo okazis internacia renkontiĝo de la soveta socio kun reprezentantoj de la organizaĵoj por amikeco kun Sovetunio el 70 landoj de la mondo. Pli ol 160 personoj el eksterlando, senditoj de 87 organizaĵoj por amikeco kun Sovetunio, partoprenis la plenkunsidojn en la Kolonhalo kaj la diskutojn en la tri specialigitaj komisionoj pri la jenaj temoj: a) „La Lenina nacia politiko kaj la soci-ekonomia progreso“, b) „La socialisma komuneco — enkorpiĝo de nova tipo de interŝtataj rilatoj“, c) „Sovetunio kaj la naci-liberiga movado“.

En la detala raporto, farita de Nina Popova — prezidantino de l'Asocio de Sovetaj Societoj por Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando, estis traktitaj ĉiuj aspektoj de tiu ekskluzive grava politika evento — la duoncentjara jubileo de la unua en la mondo socialisma ŝtato, ankaŭ ĝia rolo en la batalo por paco, amikeco kaj socia progreso de la popoloj.

La internacia renkontiĝo akceptis kelkajn dokumentojn rilate la agreson de Usono kontraŭ la popoloj de Hindoĉinio, la militfajrujon en la Proksima Oriento, kunvokon de tuteŭropa konferenco pri la problemoj de kunlaborado kaj sekureco en nia kontinento ktp.

Post la fermo de la internacia renkontiĝo per granda akcepto en la Domo de l' Amikeco inter la Popoloj oni proponis al la eksterlandaj delegitoj fari laŭ sia gusto kelktagan vojaĝon tra iu el la 15 sovetaj respublikoj.

Kun la delegitaroj el 12 landoj (Bangladeŝ, Hindujo, Pakistano, Gana, Uganda, Malajzio,

Siera Leone, Norda Irlando, Nov-Zelando, Irlando, Aŭstrio kaj Danio) mi partoprenis vojaĝon tra l'antikva kaj juna tero de Soveta Uzbekistano. Tute ne estis hazarde, ke en nia grupo estis pli da reprezentantoj de aziaj kaj afrikaj popoloj: ili venis el landoj, kiuj multjare suferis koloniisman subpremon kiel Uzbekistano antaŭ la Oktobra Socialisma Revolucio. La hodiaŭa tago de tiu ĉi soveta respubliko, situanta senpere ĉe la limo kun Afganistano kaj proksime de Hindujo, Pakistano kaj Bangladeŝ, prezentas en historia perspektivo la helan estonton de tiuj landoj, unu „fenestro“, tra kiu oni povas vidi la konturojn de la morgaŭa tago de multaj popoloj en ĉiuj kontinentoj. La vizito en Uzbekistano tamen estis tre interesa kaj instrua ankaŭ por la ceteraj delegitaroj.

* * *

Kvindek jaroj en la vivo de lando kun miljara historio — tio vere estas tre mallonga periodo. Ankoraŭ estas vivaj la reprezentantoj de la generacio, antaŭ kies okuloj okazis la grandaj revoluciaj transformiĝoj en Uzbekistano. La progreso, atingita de la juna soveta respubliko dum tiuj kvindek jaroj, estas evento de ekskluziva graveco. Situanta en la koro de Meza Azio, ĝi mem multnacia ŝtato, hodiaŭ la Uzbeka Soveta Socialista Respubliko estas viva atesto pri enkorpiĝo en vivon de la Lenin-ideoj pri amikeco inter la popoloj, brilega modelo de justa solvo de la nacia problemo.

El postrestinta apudlima regiono de cara Rusio, Uzbekistano transformiĝis en alte evoluantan socialistan ŝtaton, kiu kune kun la aliaj socialistaj respublikoj sukcese konstruas la komunisman estonton de Sovetunio. La atingiĝoj de Uzbekistano en la ekonomio, socia vivo kaj kulturo kreis por ĝi grandan aŭtoritaton kaj rekonon sur la internacia areno.

* * *

Ni traflugis per la flugiloj de potenca „TU“ la trimil kilometrojn de Moskvo ĝis Taŝkent dum iom pli ol tri horoj. Kun ni veturis ankaŭ la ĉarmanta prezidantino de la Uzbeka Societo por Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando Huĝuma Samatovna Ŝukurova. Juna, inteligenta virino, specialisto pri historio, afabla, atentema, ridetanta, ŝi trovadis varmajn vortojn por ĉiu el nia sufiĉe impona grupo kaj gajnis por ĉiam niajn simpatiojn.

Tio, kion ni eksciis de multaj reprezentantoj de la Taŝkenta socio pri la likvido de la post-

la dulingveco estas renkontata en plej diversaj specoj. Ciukaze la dulingveco (kaj multlingveco) estas vivigita de la historia neceso kaj havas grandan signifon por la socia progreso de la koncernaj popoloj.

Tute klare estas, ke la tipo de dulingveco, en kiu kiel dua lingvo montriĝas la rusa, ludas aparte gravan rolon en la vivo de la popoloj de Sovetunio; en ĝi oni povas vidi reflektiĝon de la du-unueca procedo de la nacia disvolviĝo de USSR — florado kaj proksimiĝo de la popoloj, leĝo eltrovita de V. I. Lenin.

sekvoj de la katastrofa tertremo en 1966 j., estas ankoraŭ unu brila ekzemplo pri la ne-rompebla unueco kaj frata solidareco de la sovetaj popoloj. La ruinigita centro de Taŝkent, kiu havas pli ol unu milionon kaj duonon da loĝantoj, ne povus esti restarigita eĉ dum deko da jaroj, se tio restus nur sur la ŝultroj de la respubliko. Sed laŭ la leĝoj de amikeco kaj frateco Taŝkent estis restarigita kun rapideco, antaŭ kiu paliĝas la antikva legendo pri Fenikso. Tiu, kiu hodiaŭ vizitas la urbon, ne povas eĉ pensi, ke ĝi suferis tiom peze pro la plej terura natura katastrofo. Antaŭ via rigardo ekstaras grandaj novaj kvartaloj el multetaĝaj loĝejoj kaj aliaj konstruaĵoj kun moderna komforto. Ĉiujare Taŝkent ricevas aldone po unu miliono da kv. m da loĝareo.

Mi estas fieraj, ke la loĝantaro kaj la gvidantoj de Taŝkent memoras kun sento de varma simpatio ankaŭ la kontribuon de Bulgario por la kreo de normalaj vivkondiĉoj por la suferinta de la tertremo loĝantaro. Espirimanto de la sincera danko de taŝkentanoj fariĝis k-dino Jakubĝanova — vicprezidanto de la Urba Popola Soveto. Tiu ĉi energia kaj saĝa virino parolis kun entuziasmo pri la konstruita de nia lando lernejo kun ĉiuj necesaj ejoj por rezultodona instrua kaj eduka laboro de la granda instruista kaj lernejana kolektivo. Kiom pravaj estas la vortoj de Leonid Breĵnev, diritaj antaŭ kelkaj jaroj ĉe mitingo en Sofio: „La bulgara-soveta amikeco — tio estas socialisma internaciismo en praktiko“.

(Sekvas en n-ro 12)

La 3-an de oktobro ĉ. j. forpasis en sia 68-jaraĝo en Leningrado la prezidanto de la loka Esperanto-Klubo

GEORGI NIKOLAEVIĈ TETERIN

Li estiĝis esperantisto jam 16-jara junulo kaj dum sia tuta vivo estis arda kaj sindona batalanto por Esperanto. Li multon faris por revivigo de la E-movado en USSR post la Dua Mondmilito. Kelkfoje li reprezentis la sovetlandan esperantistaron en kadre de sovetaj delegitaroj dum UEA-kongresoj.

Niajn tutkorajn kondolencojn al la proksimumuloj de G. N. Teterin kaj liaj geamikoj!

TRA LA E★ MONDO

AKCEPTO DE FRANC JONAS AL FINNAJ ESPERANTISTOJ

„Raitis Rautatieläinen“, finna gazeto, kiu en ĉiu sia numero donas kelkajn paĝojn en Esperanto, sciigas, ke en kadre de sia ŝtatvizito prezidento Franc Jonas el Aŭstrujo akceptis la reprezentantojn de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) tre bonkore en Helsinko la 26-an de majo. Dum vigla kaj bonhumora interparolo evidentiĝis, ke s-ro prezidento sciis multon pri la movado en Finnlando. Li petis la reprezentantojn de EAF transdoni amikan saluton al ĉiuj esperantistoj substrekte la vortojn kiel samideano al samidenoj. Varman manpremon ricevas Hannes Koivu, nia konata veterano kaj iama korespondamiko de la aŭstra federacia prezidento. Partoprenis la ŝtatviziton ankaŭ la juna sekretario de la prezidento, d-ro Wolfgang Loibl, kiu flue uzis la Internacian Lingvon.

En la sama gazeto ni legas, ke pli ol cent studentoj el pluraj landoj, ĉefe Usono kaj Japanio, partoprenis la oficialajn somerajn kursojn de Esperanto por instruistoj, lingvistoj kaj aliaj. La kurso okazis de la 10-a ĝis la 28-a de julio en la Universitato de Portland. Instruis d-ro D. Charters (Universitato de Indiana) kaj prof. d-ro R. E. Wood (Universitato de Louisiana).

JAPANINO VOJAĜOS TRA AFRIKO PER ESPERANTO

Oslo, Norvegujo. — La mondvojaĝantino Tamiko Kaŭakami, studentino kaj bibliotekistino, anoncis, ke ŝi intencas viziti — per helpo de Esperanto — Afrikon fine de decembro. Uzante la Internacian Lingvon, Kaŭakami pasinitis vizitis Usonon, Kanadon, Meksikon, Centran Amerikon kaj plurajn sudamerikajn landojn. En antaŭaj jaroj ŝi vizitis Sovetunion trifoje kaj vizitis tutan Eŭropon, Hindujon, Pakistanon kaj plurajn aliajn landojn. Ŝi estis intervjuita de pli ol 60 ĵurnaloj kaj ankaŭ de radio-kaj televid-stacioj. Ŝia voĵplano en Afriko inkluzivos Egiptujon, Tanzanion kaj Kenjon.

Ĉefredaktoro: Kunĉo VÂLEV

Redakta komitato: Bojka BATALSKA, Asen GRIGOROV, Tatjana EVSTRATIEVA, Venelin MITEV, Stefka HRISTOVA, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-23-3

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Esperanto-insignoj el kiu ajn materialo, maksimume ĝis dek pecoj de la sama speco ĉiam ŝanĝataj. Anticipaj kontaktoj kun partoprenontoj de la 58-a UK en Beograd serĉataj. Skribu al: Nik. Nikolov, P. K. 45, Sofio—C, Bulgario.

GDR

Geknaboj 13—14-jaraj dez. korespondi kaj interŝanĝi bk. Skribu al ilia instruisto: L. Schödl, 195 Neuruppin, Rosa-Luxemburg-Str. 37

Hungario

15 gelernantoj dez. korespondi tutmonde. Skribu al komuna adreso: Gastiganta Farmezlernejo, Vendéglátó Szakközépiskola, Hódmezővásárhely, Lenin u. 34.

Pollando

Renata Rubacha — *Piotrków Tryb.*, ul. Niepodległości 4/19 (24-jara instruistino pri lit-ro, naturo, turismo, pm, bk ka.)

Antoni Nowak — *Kielce*, ul. Skalista 71/3 (20-jara studento — pri filmoj, muziko, turismo, vojaĝoj, bk).

Jaroslav Górniak — *Opole*, pl. Lenina 10/119 (13-jara lernanto — kun ĉi pri kino, teatro, moderna muziko, pm, bk, diapozitivoj, gram. diskoj k. a.).

Lucja Graczyk — *Barein*, ul. Mogileńska 7/35, pow. Szubin, woj. Bydgoskie (20-jara —

pri junulara muziko, gram. diskoj, pm k. a.).

Wiesława Piecinkiewicz — *Polanica 2 dr.*, ul. Lakowa 22, woj. Wrocław (21-jara — pri filmoj, junularproblemoj, geografio, speciale de Afriko, bk, k. a.).

Sovetunio

Anoj de E-klubo dez. korespondi kaj interŝanĝi suvenirojn, bk, pm k. a. Skribu al komuna adreso: Sovetunio, Litovio, *Kretinga*, Kulturos namai, Esperanto Klubo (kaj fiksi la nomon: Bra inskiene Birute — 28 j. medicinfratiro; Luža Adomas — 15 j. lernanto; Jurevičim Vitaŭtas — 14 j. lernanto; Ronkute Irena — 37 j. instruistino; Mažionis Algis — 15 j. lernanto; Dambraŭskiene Ona — 32 j. oficistino; Treigite Virginia — 14 j. lernantino; Dambraŭskas Antanas — 30 j. ŝoforo; Matkevičiute Raminta — 14 j. lernantino; Kirkil ene Olga — 41 j. agronomino; Šoblinskaite Birute — 18 j. lernantino; Valutelite Danute — 23 j.; Juškevičius Petras — 25 j. teknologo; Raŭdonite Dangyoutė — 17 j. lernantino; Baltrutite Virginia — 18 j. studentino; Pipraite Danute — 18 j. vendistino; Matkevičiene Juze — 45 j. teknikistino; Bružaite Vale — 14 j. lernantino; Mitkevičiute Raimonda — 15 j. lernantino).

Ludmila Sapjelkina — *Minsk*—70, Partizanski prospekt, 18—15 (25-jara kun ĉi pri ĉt.).

Vladas Ruževičius — 233 099 *Kaunas*, R. Arm. pr. 222—525, Litovio (29-jara radioingeniero — kun ĉi pri radioelektroniko, interlingvistiko, E-literaturo k. a.).

Jurij Alek. Potapov — *Rostov/Don* 8, str. Engelsa 15, kv. 3 (inĝ. konstruisto — pri pacdefenda kaj E-movadoj, popolkutimoj).

DU GRAVAJ KURSOJ EN USONO POR ANGLALINGVANOJ

Novjorko kaj Greenfield, Mass., Usono. — Du gravaj eldonejoj ĵus preparis Esperanto-kursojn por anglalingvaj komencantoj. La „plifortiganta uzo de Esperanto kiel internacia „dua lingvo“ instigis la eldonejojn de edukaj materialoj Channing Bete ellabori sian kurson. „A First Course in Esperanto“ (Unua Kurso de Esperanto), eldonita de Channing Bete, Greenfield, Mass., 1972 kaj verkita de William Auld, estas dek-leciona, 32 p., broŝurita kurso, kiu taŭgas por klasoj aŭ memstudo. La aŭtoro, William Auld, skota literaturo kaj edukisto, mem aplikis la novan kurson en San Francisco, State College en Usono. Ses kasetsonbendoj, sur kiuj s-ro Auld prononcas la ilustran materialon de ĉiu leciono, estas ankaŭ haveblaj.

La plej ampleksa surdiska Esperanto-kurso iam produktita estas nun pretigata de alia usona eldonejo, Parents Magazine, en Novjorko. La kurso celas instrui bazan Esperanton al anglalingvanoj per 14 lecionoj sur 14 longe-

daŭraj diskoj kaj per akompanaj lernolibroj kaj vortaro. La paro'antoj estas d-ro Humphrey Tonkin el la universitato de Pennsylvania, lia edzino, kaj prof. Jonathan Pool el la universitato de Novjorko en Stony Brook. Laŭ la opinio de la fama lingvisto Mario Pei, la lecionoj estas „bone planitaj“, bele parolitaj kaj pedagogie altkvalitaj“. Prezo kaj aĉetkondiĉoj estas ankoraŭ anoncataj.

Channing Bete kaj Parents' Magazine ne estas la solaj usonaj eldonejoj, kiuj lastatempe aperigis Esperanto-librojn. Bela traduko de la porinfana klasikaĵo Winnie-la-Pu fare de Ralph Lewin kaj Ivy Kellerman Reed ĵus aperis en eldono de E. P. Dutton.

ESPERANTO EN NOVA UNIVERSITATO

Esperanto estas unu el la regulaj studobjektoj en la nova „Sendependa Universitato de Aŭstralio“ en Morwell, Victoria, Aŭstralio. La direktoro de la nova universitato, s-ro I. T. Madern, estas la loka delegito de UEA.